

37a jaro. Nro 88a. 2a semestre 2011.



# VENEZUELA STELO

Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451



**La 28a Internacia  
Festivalo en Xanten**

**Virgulino de la Paco**

**La 78a Itala Kongreso de Esperanto**

**Venezuela de Antier (Venezuelo de la Pasinto)**



# Enhavo

**Naciaj Novaĵoj** paĝo 3a**La 28a Internacia Festivalo en Xanten**  
Raportas: Liba Gabalda paĝo 4a**Letero de Etsuo Miyoshi** paĝo 6a**Iu ajn tago (Un día de estos)**  
Tradukis: Ricardo Coutinho paĝo 7a**Virgulino de la Paco**  
Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho paĝo 8a**La SAT-Postkongreso en Hercegovino**  
Raportas: Liba Gabalda paĝo 10a**Juan Félix Sánchez**  
Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho paĝo 12a**La 78a Itala Kongreso de Esperanto**  
Raportas: Liba Gabalda paĝo 16a**Venezuela de Antier**  
**(Venezuelo de la Pasinto)**  
Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho paĝo 18a**Greguerías: La spritaĵoj de Ramón Gómez de la Serna**  
Ramón Morales Castel paĝo 22a**Word Race: unua iPhone-ludo en Esperanto!**

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondekas iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

**VENEZUELA STELO**  
Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio**AVE**  
Asociación Venezolana de Esperanto  
Venezuela Esperanto-Asocio

**VENEZUELA STELO**  
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A  
telefonnumero 58-0212.662.9224  
[www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)  
[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)

**Redakcia Komisiono:**  
Johano Negrete, Esteban Emilio Mosonyi  
kaj Ricardo Coutinho.

**Grafikisto:** Ramón Morales Castel.

**Estraranoj:**

**Prezidanto:** Johano Negrete.  
**Vic-Prezidanto:** Juan Miranda.  
**Sekretario:** Ricardo Coutinho.  
**Kasistino:** Elizabeth Miranda.

**Aldelegitoj:**  
Esteban Mosonyi  
(Konferencoj kaj Interinstituciaj Rilatoj).  
Nancy Aquino (Eldonado).  
Aquiles Rivas (Biblioteko).  
Silvana Messori (Instruado).

**Kunlaborantoj:**  
Liba Gabalda.  
Ramón Morales Castel.





# Naciaj Novaĵoj

## Kurso de Esperanto en la Universitato

En oktobro 2011, la profesoro Johano Negrete malfermis bazan kurson de Esperanto en la Lernejo de Filozofio en la Centra Universitato. Pro la ofta eraro de la administrado de tiu departemento pri la Kursoj Interfakultataj, tiu kurso atingis nur du lernantoj, la fraŭlino Iriana Moreno de la Lernejo de Historio kaj la fraŭlo Humberto Ameta de la Lernejo de Filozofio kaj Lernejo de Modernaj Lingvoj.

## Ĝenerala Asembleo

En 22a de oktobro 2011, okazis la Jara Asembleo, oni elektis la saman estraron, ja kotizo por membroj aktivaj estas 400 jare, la karakasanoj pagas 50 monate por subteni la oficejon.

## Zamenhofa Vespero

Je la 15<sup>a</sup> de decembro 2011 okazis nia Zamenhofa Vespero en nia sidejo, partoprenis membroj de nia asocio kaj kelkaj familianoj, oni manĝis meksikajn manĝaĵojn, trinkis vinoj kaj kolaon dume oni aŭdis KD-ojn de JoMo, Carina, Aleksandro Cossabela ktp.

## Esperanto 125

Por dissendi konon pri la 125-jariĝo de Esperanto, Venezuela Esperanto-Asocio presas glumarketojn kun la mesaĝo "ESPERANTO 125 años" (Esperanto 125 jaroj), kaj kun la emblemo kaj la adreso de la asocio.

## Bulteno Lingvo & Internacia Komunikado

Kelkaj numeroj de la bulteno kelkaj jaroj antaŭe redaktita de Profesoro Johano Negrete, **Lingvo &**

**Internacia Komunikado** (grafikita de Silvana Messori) en la "Universidad Pedagógica Experimental Libertador-IPC" (Karakasa sidejo), estos disponeblaj en la reto je formo de PDF-dosieroj. Nun disponeblas nur numeroj 17a kaj 18a (2001) per la jenaj ligiloj: <http://www.scribd.com/doc/80355356/Lingvo-Internacia-Komunikado-Numero-17> kaj <http://www.scribd.com/doc/80357213/Lingvo-Internacia-Komunikado-Numero-18>.

### Lingvo & Internacia Komunikado

Lengua & Comunicación Internacional

Boletín No. 17, julio 2001

Universidad Pedagógica Experimental Libertador  
 Instituto Pedagógico de Caracas  
 Subdirección de Extensión  
 Subdirección de Investigación y Posgrado

**Editorial**

**KOFI ANNAN SALUTAS EN ESPERANTO**

Releído Kofi Annan como Secretario General de la ONU, bueno es recordar que en el 2000 -año de la cultura de paz y tolerancia- el dirigió un mensaje de salutación a la comunidad de Esperanto por medio de la *International Academy of Sciences*, Filial México, (véase LK-16, p.3). AIS también usa y promueve el idioma internacional Esperanto en las ciencias. Publicamos hoy -en lugar de una editorial- su mensaje, que consideramos de actualidad y de particular interés.

KOFI ANNAN  
(Secretario General de la ONU, Septiembre 2000)

Con gran placer les doy mis mejores y más cálidos deseos a los que trabajan por el Idioma Internacional Esperanto en todo el planeta. El comienzo del nuevo milenio nos da una ocasión única para pensar sobre nuestro destino común, en un momento en el que los seres humanos estamos interconectados como nunca antes. Las ventajas de la globalización son evidentes. Más rápido crecimiento, mejor estilo de vida y nuevas posibilidades. Sin embargo, han surgido reacciones contrarias, porque la distribución de esas ventajas es muy desigual y el mercado mundial aún no está regulado sobre la base de objetivos sociales comunes.

**INDICE**

Editorial: (Kofi Annan salutas en Esperanto! (pág. 1)  
 El siglo de la mujer. (Milagros Espinoza: Frases de Krishnamurti) (p. 2)  
 Tu Rolito: El presente año (2001). (F. Escamilla) (pp. 3 y 7)  
 Noticias: En la Monda. (En Venezuela) (p. 3)  
 Manifiesto de Praga (pp. 4-5)  
 Noticias: Lengua y Literatura, pero comunas. (J. Negrete) (p. 6)  
 Falsas y Opiniones del Maestro M. Saad. (J. Riballard) (p. 6)  
 Premio de la UNESCO al ERA. (p. 7) La Aldea del Mundo (p. 7)  
 Diálogos Indígenas. (Esteban Emilio Monroy) (p. 8)

Redacción: Juan Negrete  
 Diagramación: Silvana Messori  
 Apartado 47301, Caracas 1041-A  
 jnegrete@reaccion.ve

Lingvo & Internacia Komunikado No. 17 7/7/2001 página 1

# ESPERANTO 125 años

**AVE**  
 Asociación Venezolana de Esperanto  
 Venezuela Esperanto-Asocio  
 ASOCIACIÓN VENEZOLANA DE ESPERANTO.  
 APARTADO POSTAL 47675, CARACAS 1041-A.  
 www.esperanto-venezuela.org

# ESPERANTO 125 años

**AVE**  
 Asociación Venezolana de Esperanto  
 Venezuela Esperanto-Asocio  
 ASOCIACIÓN VENEZOLANA DE ESPERANTO.  
 APARTADO POSTAL 47675, CARACAS 1041-A.  
 www.esperanto-venezuela.org

# ESPERANTO 125 años

**AVE**  
 Asociación Venezolana de Esperanto  
 Venezuela Esperanto-Asocio  
 ASOCIACIÓN VENEZOLANA DE ESPERANTO.  
 APARTADO POSTAL 47675, CARACAS 1041-A.  
 www.esperanto-venezuela.org





**28a Internacia Festivalo en Xanten 27.12.2011 - 3.1.2012**  
**Raportas: Liba Gabalda**

Kadra temo: BENELUKSO

La jarfina Internacia Festivalo prezentas altkvalitan programon kaj riĉan originan Esperanto-kulturon el pluraj landoj de la mondo. Dumtage ni ĝuas diversajn seriozajn prelegojn, seminariojn kaj aliajn interesajn aktivaĵojn. La vesperaj programeroj estas kutime distraj.

Ĉi-foje oni elektis Xanten por realigo de la 28-a IF. Ĝi situas apud la nederlanda limo kaj ne tre malproksime de Belgio kaj Luksemburgio. La kadra temo estis “Benelukso”. Kun la urbo kaj la apuda arkeologia parko ni povis konatiĝi dum duontagaj ekskursoj.

Al la aranĝo aliĝis 121 geesperantistoj el 17 landoj. La plej foraj venis el Japanio, Brazilo, Israelo, Rusio. Partoprenis ĝin ankaŭ la germana ambasadoro en Rusio Ulrich Brandenburg kun sia edzino. La aranĝo komenciĝis per interkona vespero kun multaj amuzaj programeroj. La unuan tagon estis pritraktita la kadra temo. Matene okazis forumo, kiel enkonduko al pluraj prelegoj tuŝantaj tiun ĉi temon. Ĝin lerte gvidis Claude Nourmont kaj Kristin Tytgat. En la semajno eblis elekti el multaj aliaj prelegoj pri variaj temoj. Allogis ĉefe tiuj pri diversaj vojaĝoj. Amri Wandel el Israelo prezentis al ni afrikan kontinenton. En Tanzanio li surgrimpis monton Kilimanĝaro. En Namibio ravis lin la Himba-tribo. Li entuziasme rakontis pri siaj aventuroj dum ni spektis nekutimajn pejzaĝojn. La franco Rémy Bouchet donis informojn kaj promenigis nin pere de belaj bildoj tra Laoso. Ugo kaj Annarosa el Italio partoprenis la unuan kongreson de Armena E-Asocio. Ili raportis pri la evento kaj parolis pri siaj spertoj en tiu ĉi reva lando. Tatjana Loskutova estis instrucele en Indonezio - la lando de ĉiama somero. Ŝi instruis Esperanton en kvin lokoj de la insuloj Javo kaj Sumatro kaj ŝi ankaŭ vizitis insulon Bali. Japana paro, gesinjoroj Huĝimoto, raportis pere de filmoj pri la tertremo kaj la cunamo, kiuj trafis ilian landon printempe, kaj ties konsekvencoj.

Okazis du E-kursoj, tenis-turniro, kutima ĉina gimnastiko kaj la danvespero. Grandan sukceson havis atelieroj pri produktado de belaj ornamaĵoj el bidoj por la silvestra vespero kaj prilaborado de

steatito (sapŝtono). Esperanto-retojn kaj fabelan mondon alproksimigis al ni Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko el Rusio. Ni admiris ilian ekspozicion de fantaziaj kreaĵoj. Pri la tradicia sporta evento en Nijmegen informis Rob Keetlaer. La historion de enciklopedioj kaj la fonon de Vikipedio klarigis Ziko van Dijk. Pri la moskva eldonejo Impeto parolis Dima, Anna kaj Mikaelo, pri la armena skribaro Susanna Baghdasaryan, pri korea ginsengo, alta sango-premo kaj kolesterolo informis Harald Schicke. Kun Kees Ruig oni povis mediti kaj mantrumi. Aŭtoraj horoj okazis kun Mikaelo Bronŝtejn kaj Anneke Schoute-Buys. Dum vesperaj programeroj ni ĝuis rusan, nederlandan, israelan kaj internacian vesperojn. Ĉiu havis sian ĉarmon kaj alportis ion novan al la partoprenantoj. La plej elstara spektaklo estis la brila prezentado de la teatraĵo “Ludoviko” de Georgo Handzlik. Lia alia sukcesplena vespero estis gitarkoncerto. Post la fino de ĉiuj vesperaj prezentaĵoj ni translokiĝis al la “Knajpo”, kie ni ĝuis bonan etoson ĝis malfruaj noktohoroj.

Jam tradicie, okazis la 5-a IVU (Internacia Vintra Universitato) en kiu multaj partoprenantoj ekzameniĝis kaj ricevis diplomojn. La astrofizikisto Amri Wandel ĉiam surprizas kaj donas novaĵojn el la scienca esplorado de la kosmo. Lia plej interesa prelego prezentita dum IVU temis pri: “Novaj planedoj kaj sunsistemoj”.

La tuttaga ekskurso celis nederlandan urbon Nijmegen, kie ni promenis sub la gvido de “kapitano” Kees Ruig kaj loka esperantisto. Poste ni ŝipkrozadis sur rivero Wall manĝante bongustajn patkukojn.

Post la tradicia silvestra bankedo, la balo estis inaŭgurita per polonezo. Sekvis plurfoja festado de la Nova Jaro laŭ diversaj horzonoj. La Novjara promeno laŭ la lago refreŝigis la partoprenantojn.

La festivalo estis bone organizita de nia kara HDP (Hans-Dieter Platz) kaj ni jam ĝojatendas la venontan ĉi-jarfine en Dortmund por komune ĝui neforgeseblan semajnon en amika internacia rondo.

*Liba Gabalda*







28a Internacia Festivalo en Xanten 27.12.2011 - 3.1.2012 Raportas: Liba Gabalda



28-a INTERNACIA FESTIVALO



XANTEN



27.12..2011 – 3.1.2012







# Letero de Etsuo Miyoshi

*Plej necese estas koni la ĝustan tempon agi*

Estante komercisto, pri reklamado mi ja scias, sed pri reklamado de Esperanto mi bezonis investi tempon kaj monon. Mia unua sperto estis en 2002 en Danio kaj sekvis Belgio, Francio, Germanio, Italio, ktp; entute 13 landoj. Ĉiam, ion novan mi lernis survoje: pli altiras konkretaĵoj, necesas laboro de grafikisto kaj reklamisto, taŭgas mallongaj tekstoj, ktp.

Mia celo estas vekti la amaskomunikilojn, ĉar sen ili ni ne povas esperi pri la fina venko. Konsekvenco de tio estos la konkero de la popolo, kiu siaflanke influos la politikistojn.

Post 9-foja reklamado en Le Monde, en junio 2010 mi negocis la aperigon de novaĵo pri lingva malegaleco. Tamen ilia reprezentanto, S-ro Meixner, diris, ke intereso ne estis. Mi, do, planis prelegvojaĝon al 9 francaj urboj por varbi reagantojn al la Z-taga tutpaĝa anonco.

Post prelego en Parizo mi veturis al Vannes, kie mi subite malsanis. Mi telefonis al mia edzino: « Mi revenos, ĉar mi ne povas spiri ». Ŝi respondis: Esperanto-Movado estas pli grava ol via vivo, do daŭrigu. Sed mi ne povis teni min kaj kiam mi alvenis Osakon, ne povis moviĝi.

La publiko serioze kaj sincere aŭskultis. Post apero de la reklamo, mi ricevis centon da leterkopioj al Le Monde; verŝajne ĝi ricevis pluroble pli ol mi. Al la publika intereso, ilia respondo estis ignorado. Mi sentis, ke mi staras antaŭ giganta kaj fortika muro pro desupra premordo kaj ke ili estis monavidaj... sed 'dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj'.

Kio estas la rezultoj de la agado en ĉi tiu jardeko? Inter la negativaĵoj menciendas, ke en la komenco la reklamado ne sufiĉe profesiis: ne persvada enhavo, tro da tekstoj, ne konkretaj informoj, ne taŭga aspektigo. Plie, mi nur 1-foje reklamis en 1 lando... ja ripetado estas esenca.

Kiam aperis la anonco en Rzeczpospolita en 2004, okazis lunĉodebato en Varsovio kun la litovaj kaj polaj EU-parlamentanoj. Tiam Bronisław Geremek, EU-vicprezidanto kaj eksa ministro pri eksterlandaj aferoj en Pollando, rifuzis ĉeesti kaj private renkonti min, ĉar li konvinkiĝis, ke Esperanto ne povus venki. Tamen en majo 2008 mi sukcesis tuŝi lian koron per anonco en 'Le Monde'. Tiam EU rifuzis utiligi la polan en sia retejo kaj post kunveno kun Seán Ó Riain kaj Jozef Reinart li kunorganizis la debaton 'Esperanto, ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo?' por ĉiuj parlamentanoj la 14-an de julio. Tragike li mortis aŭtackcidente survoje al Bruselo. Li estis konvinkita, ke plejparto el la EU-parlamentanoj kontraŭas la anglan dominadon kaj ke estas granda manko de scioj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto. De liaj observoj ni profitu!

La anoncoj vekis homojn kiel Isabel Castro, direktoro de Eurimages aŭ la urbestron de St-Aignan de Grand Lieu, kiuj montris intereson pri la lingvo kaj la Movado. Post aperigo en La Repubblica en 2003, 8 italaj parlamentanoj promesis al Itala E-Federacio proponi la utiligon de E-o en la Eŭropa Komisiono. Unu el ili, Emerenzio Barbieri, dum la nuna parlamenta mandato



[e.miyoshi@swany.co.jp](mailto:e.miyoshi@swany.co.jp)

prezentis leĝproponon pri nia lingvo.

Ĉu ankoraŭ menci, ke la hejmpaĝoj de la landaj asocioj en la anonclandoj estis pli vizitataj sekve de la reklamoj? Aŭ ke pliaj lernantoj aperis en la kursoj? La slovaka diplomato Josef Reinart sendis kopiojn de la aperaĵo en SME en 2004 al ĉiuj slovakaj ambasadejoj tra la mondo kaj oficistoj de la ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Ĉu reklami estas vana elspezo? Certe ne, sed investo en la estonteco, ĉar se EU agnoskos Esperanton, la mondo tuj sekvos.

Esperanto estas varo same kiel Coca-Cola, McDonald's, ktp. Se ni ripete montras la solvon al la nuna lingva malegaleco, ni havos la ŝancon sukcesi, ekzemple per samtaga reklamado dum unu jaro ĉiumonate en la 27 EU-landoj. Nun oni simple cedas antaŭ la ĝeneraliĝo de la angla. Nia misio estas vekti la homaron de tiom vasta soporo, imitante Ludovikon. Mi pensas, ke tia senprecedenca agado povus utili kiel brulŝnuro. Ni ne perdos ĉion. Certe io sekvos. Ni bezonas investi por sukcesi. Ĉiu organizo kaj kompanio progresas aŭ regresas. Ne ekzistas horizontala flugo.

Ĉi kampanjo okazu kadre de pli vasta strategio, kio inkluzivu ekzemple, ke LA konigu la reklamojn al iliaj landaj kaj EU-parlamentanoj, varbado de kursanoj aŭ aliaj agadoj laŭ la landaj kondiĉoj. Ankaŭ tio altiros la amaskomunikilojn kaj Esperantujo vigliĝos.

Mia unua reklamo kostis pli ol EUR 70.000 kaj la prezo trioniĝis kondiĉe al 10-foja ripeto. La nuna UEA-havaĵo larĝe sufiĉas por tio. Kion la Esperantistaro opinias? Mi dankas al Seán Ó Riain, Renato Corsetti, la estroj de Landaj Asocioj kaj tradukistoj pro la valora kaj sindona apogo dum nia febra kontaktado.

Majstro Hidemaru Deguĉi, kiu sugestis en 1923 adopti Esperanton al Majstro Onisaburo Deguĉi, diris: Homoj ĝenerale alkroĉitaj al la nuno, forgesas la pasintecon kaj ignoras la estontecon. Ni, do, kuraĝe agadu por ke 'la nepoj nin benu'!

*Etsuo Miyoshi*







## Iu ajn tago (Un día de estos)

**Aŭtoro: Gabriel García Márquez - Tradukis: Ricardo Coutinho**

Varmete kaj senpluve vekas lundo. Sinjoro Aŭrelío Escovar, dentisto sendiploma kaj tre bona frumatenvokanta, malfermas sian laborejon je la sesa. Li prenas el la vitromontrejo falsan dentaron ankoraŭ freŝfarita kaj en la gipsa muldilo kaj surtabligas kelkajn ilojn kiujn li ordigas laŭ iliaj longecoj, kiel ekspozicio. Lia ĉemizo estas kun strioj, senkoluma, fermita supre per ora butono, kaj la pantalono havas ŝelkon elastan. Li estas rigida, maldika, kaj lia rigardo malofte rilatas kun la situacio, kiel la rigardo de sordulo.

Kiam la ilaro estas sur la tablo, li proksimigas la frezilon al la risorta brakseĝo, eksidiĝas kaj poluras la falsan dentaron. Ŝajnas ke li ne pensas pri lia laboro, sed laboras obstine, pedalas la frezilon eĉ kiam jam li ne bezonas tiun ilon.

Post la oka li haltas kaj vidas la ĉielon el la fenestro kaj rigardas du ripozantajn katartojn kiuj sekiĝas per la suno sur firsto de la najbara domo. Li havas sensacion ke antaŭ la tagmanĝo denove pluvos. La voĉo mallaŭta de sia filo 11jara prenas lin el la abstracio.

— Paĉjo  
— Kio okazas?  
— Petas la urbestro ke vi elprenu vian mueldenton.  
— Diru al li ke mi ne estas tie ĉi.

Li poluras la oran denton, malproksimigis ĝin brakdistance kaj ekzamenas ĝin per duonfermitaj okuloj. El la atendejo lia filo denove krias.

— Li diras ke vi faros tion ĉar li jam aŭdis vin.

La dentisto daŭras sian dento-ekzamenadon. Nur kiam li finas la taskon kaj surtabligas ĝin, diras:

— Pli bone.

Denove uzas la frezilon. El de kartona skatolo kie li konservas farendajojn, li prenas polurilon kaj poluras la oraron.

— Paĉjo  
— Kio okazas?

Li ne ŝanĝas sian vizaĝon.

— Li diras ke se vi ne elprenus lian mueldenton, li pafus vin.

Sen rapideco, per movo tre tranvila, li haltas petali la frezilon, malproksimigas ĝin de la brakseĝo kaj malfermas tute la suban tirkeston de la tablo. Tie estas la pafilon.

— Nu, venu kaj pafu min.

Li ĝiras la brakseĝon ĝis esti fronte al la pordo, kun la mano ĉe la tirkesto. La urbestro aperas el la sojlo. Li nur razis duonvangan maldekstran, sed la alia, ŝveligita kaj dolora, havas barbon de kvin tagoj. La dentisto vidas tra liaj okuloj velkitaj multajn noktojn kun sufero. Li fermas la tirkesto per la pintoj de liaj fingroj kaj diras mallaŭte:

— Sidiĝu.  
— Bonan tagon. Diras la urbestro.  
— Bonan.. Diras la dentisto.

Dum la ilaron bolas, la urbestro ripozas sian kapon ĉe la kapapogilo kaj li nun plikonfortiĝas. Li spiras glacian odoron. Tiu loko estas malriĉa: malnova seĝo el ligno, pedala frezilo kaj vintromontrejo fajencopomela. Fronte al la seĝo, estas fenestro kun kontraŭfenestro ŝtofa alta kiel homo. Kiam la urbestro sentas ke la dentisto proksimiĝas al li, li surplankigas la kalkumon kaj malfermas la buŝon.

Sinjoro Aŭrelío Escovar movigas lian vizaĝon direkten al la lumo. Post vidi la difektitan mueldenton, tuŝas perfingre ĝin kun prudenton

— Mi elprenos ĝin senanestezie.  
— Kial?  
— Ĉar ĝi havas absceson.

La urbestro rigardas liajn okulojn.

—Mi konsentas— diras li, kaj klopodas rideti. La dentisto ne reciprokas al li. Li alportas al la tablo la ilaron bolitan kaj prenas el la akvo malvarman pinĉilon, tute trankvile. Poste li alproksimigas la kraĉujon al li per la pinto de sia ŝuo kaj li lavas siajn manojn en la lavujo. Li faras ĉion sen rigardi la urbestron. Sed la urbestro ne lasas rigardi lin.

Ĝi estas suba saĝo-dento. La dentisto malfermas la piedojn kaj streĉas la malvarman dentprenilon. La urbestro kroĉiĝas la brakojn de la seĝo, fluigas sian forton al la piedoj kaj sentas malplenan glacian en la renojn, aldone spiras malmole. La dentisto nur movigas sian pojnnon. Sen-rankore, kun amara kormoleco, diras:

— Tie ĉi, oni pagas al ni per dudek mortoj, leŭtenanto.

La urbestro sentas la krakon de la ostoj en la makzelo kaj siaj okuloj pleniĝas el larmoj. Sed li ne sopiras ĝis kiam sia mueldento elbuŝiĝas. Tiam li vidas ĝin tra la larmoj. Por li ĝi estas tre malproksima al sia doloro, eĉ li ne povas kompreni la torturon kiun li suferis dum kvin pasintaj noktoj. Li proksimiĝas al la kraĉujo, ŝvite, senelspire, li malbutonumas sian tunikon kaj serĉis senrigardi la mantukon el la poŝo de la pantalono. La dentisto donas al li puran ĉiponon.

— Malsekiĝu viajn larmojn—diras.

La urbestro faras tiel. Ankoraŭ li tremas. Dume la dentisto lavas siajn manojn, vidas la plafonon malbelan kaj pulvoran araneaĵon kun aranevoj kaj mortitaj insektoj. La dentisto reiras sekante la manojn.

— Kuŝu—diras la dentisto— kaj lavu vian buŝon per sala akvo.

La urbestro staras, adiaŭas laŭ la milita kutimo, kaj iras al la pordo kun la piedoj rigidaj kun la malbutonumita tuniko.

— Faru la kvitancon—diras li.  
— Ĉu por vi aŭ por la municipo?

La urbestro rigardas lin. Malfermis la pordon, kaj diras, tra la metalreta pordo.

— Tioj estas la sama afero.







## **Virgulino de la Paco** **Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho**

La Monumento de la Virgulino de la Paco (El Monumento a la Virgen de la Paz) estas ega skulpturo rememoriganta de la Virgulino Maria, ĝi estis farita entute el betono, sur 11 kilometroj sude de la urbo *Trujillo* en Venezuelo. Ĝi havas 46,72 metroj de alteco, 16 metroj de longeco, 18 de profundeco en la bazo kaj 1200 tunoj, ĝi estas la skulpturo enirebla plej alta el Ameriko, kelkaj centimetroj pli alta ol la Statuo de la Libereco.

La monumento estas je 1.600 metroj de alteco, en la nomita *Peña de la Virgen*, tie aperis la virgulino je la jaro 1570. Estis inaŭgurita je 1983 de la tiam respublika prezidanto Luis Herrera Campins, tiu mirindaĵo estis desegnita de la skulptisto Manuel de la Fuente kaj elkalkulita de la inĝeniero Rosendo Camargo. Ĝi enhavas kvin rigardospacojn kie oni povas rigardi la preskaŭ tutajon de la urbo de Trujillo kaj la belegan tropikan pejzaĝon.



**Urbo de Trujillo rigardata el la Statuo de la Virgulino de la Paco**







**Virgulino de la Paco** Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho



**Preĝejo en la ĝardeno de la monumento de la Virgulino de la Paco**







## **La SAT-Postkongreso en Hercegovino**

### **Raportas: Liba Gabalda**

Sabate la 6-an de aŭgusto finiĝis la 84-a SAT-kongreso en Sarajevo. Nur kvin gesamideanoj aliĝis al la postkongresaj ekskursoj. La programon organizis kaj gvidis Senad Ĉolić. Dum kvar tagoj ni ĝuis agrablan etoson vizitante interesajn lokojn en la bela suna Hercegovino. Antaŭ la forveturo al la nova aventuro ni unue piedpromenis tra platan-bordita aleo kondukanta al la fonto de la rivero Bosna. Revene ni uzis kaleŝon. La programo komenciĝis postagmeze. Unue ni veturis al la lago Boračko, kie ni fiŝpiknikis ĉe la bordo de la rivero Neretva kaj poste ni vizitis la atraktivan urbon Konjic, kies ŝtona ponto el la 17-a jarcento estis detruita dum la dua mondmilito, sed denove rekonstruita en la jaro 2009.

Sekvan tagon, survoje al la urbeto Počitelj ni vizitis militan muzeon en Jablanica. Ekspozitaĵoj atestas pri batalo sur la rivero Neretva. Ekstere videblas restaĵoj de la detruita fervojponto. En Počitelj ni instaligiĝis en komforta rezidejo por tranokti kaj poste ni promenis tra ŝtonpavumitaj stratetoj de la orient-stila urbeto el otomana epoko. Ĝin dominas horloĝturo, la moskeo (Hadži-Alijina džamija) kaj la mezepoka fortikaĵo el la 14-a jarcento. De tie estas bona panoramo al la rivero Neretva kaj vasta valo. La urbeto estas deklarita de Unesko kiel Monda heredaĵo. Survoje al la urbo Stolac ni haltis ĉe la nekropolo Radimlja por vidi mezepokajn tomboŝtonojn. En Stolac ni promenis laŭlonge de la rivero Bregava kaj poste vespermanĝis. Ĉiutage ni manĝis bongustegajn frititajn trutojn breditajn surloke.

Lunde nia grupeto admiris belan pejzaĝon en la natura rezervejo Hutovo Blato. Navigante tra kanalo sur boato observis netuŝitan naturon, kie nestas pluraj specoj de birdoj. Ĝi ankaŭ estas unika oazo por migrantaj birdoj, por pluraj specoj de fiŝoj kaj aliaj akvobestoj. Poste ni vojaĝis al la akvofalo Kravac, kie multaj homoj baniĝis kaj ĝuis malvarman akvon dum varmega tago. Ankaŭ niaj du kuraĝuloj refreŝiĝis. Agrabla estis renkontiĝo kun lokaj esperantistoj kiuj akompanis nin. Proksime de la mezepoka urbo Ljubuški ni vizitis franciskan muzeon.

Atraktiva estis ekskurso al Dubrovnik, famkonata urbo en Kroatio, situanta ĉe la Adriatika marbordo. Ĉiuj estis ravitaj pro ĝiaj pitoreskaj mallarĝaj stratetoj kaj romantikaj placetoj. Turistoj abundis. Revene ni haltis en la urbo Trebinje, kie ni renkontiĝis kun Simo Milojević, nuntempe loĝanta tie. Kun li ni pasigis agrablajn horojn manĝante en belstila restoracio ĉe la rivero Trebišnjica. Tiel finiĝis la postkongresa ekskursado tra suda parto de Hercegovino. Ĝi postlasis en ni belajn rememorojn. Koran dankon al nia gvidanto Senad pro la perfekta kaj plensukcesa aranĝo!

*Liba Gabalda*







# La SAT-Postkongreso en Hercegovino

Raportas: Liba Gabalda

Venezuela Esperanto-Asocio



Jablanica



Lago Boračko



Konjic



muzeo



nekropolo



Solac



Franciskana muzeo



Poçitelj



Poçitelj



Hutovo Blato



## La postkongreso en Hercegovino




Kravec



Dubrovnik



Trebinje



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda






## Juan Félix Sánchez

### Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho

Juan Félix Sánchez Sánchez nakiĝis en *San Rafael de Mucuchíes* en la subŝtato Merido (16an de majo 1900), lia familio estis tipa de tiu loko, liaj gepatroj estis Benigno Sánchez kaj Vicenta Sánchez. Li lernis nur la bazan edukadon kaj dediĉis poste al la agrikulturo, kaj desegnis objektojn per naturaj materialoj por faciligi sian vivon kaj skulptaĵojn.

Li vojaĝis nur al Marakaibo, Kumanao kaj Karakaso, en Mukuĉies (*Mucuchíes*) estis elektita por kelkajn municipajn postenojn. Jaroj poste li konis al Epifania Gil kaj edziĝis kun ŝi. Ekde tiam ili traslokiĝis al *Tisure* (en la montaro, ses horoj poste de Mukuĉies, kun la helpo de sia Epifania li konstruis la preĝejeton el ŝtono (sen cemento) dediĉita al la Virgulino de Koromoto, ili faras la saman konstruaĵon ĉe Mukuĉies, tie ili estas entombitaj. Li mortis je 18a de aprilo 1997, 96-aĝa.



**Juan Félix Sánchez kaj Epifania Gil**



**Preĝejo de Juan Félix Sánchez en la montaro**





**Juan Félix Sánchez** Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho



**En la Preĝejo**



**Muzeo pri Juan Félix Sánchez apud la preĝejo**






**Juan Félix Sánchez** Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho



**Skulptaĵoj de Juan Félix Sánchez**



**Skulptaĵo de Juan Félix Sánchez en la montaro, foto en la muzeo pri tiu artisto**





# Juan Félix Sánchez

Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho

Venezuela Esperanto-Asocio



**Ilaro de Juan Félix Sánchez**



**Lito de Juan Félix Sánchez**



**Tekstaĵoj uzitaj de Juan Félix Sánchez** ★







## **La 78a Itala Kongreso de Esperanto 20-27.8.2011**

### **Raportas: Liba Gabalda**

Torino estis la unua ĉefurbo de Italio. Ĉi jare oni festis la 150-an jubileon de Italio. En la tuta lando flirtis hisitaj naciaj flagoj. Festantaj homamasoj kaj multaj turistoj venis por ĝui la eventon. Jam la kvaran fojon Torino gastigis la Italan E-Kongreson. Partoprenis ĝin pli ol 250 geesperantistoj el 30 landoj. Krom multaj eŭropanoj venis gesamideanoj el Indonezio, Brazilo, Madagaskaro, Israelo, Usono. Al la ĉeftemo “Kaj nun ni estu eŭropanoj” estis dediĉita unu el la du seminarioj. La Landa Kongresa Komitato preparis buntan kaj interesan semajnan programon kaj zorgis pri ĝia bona disvolviĝo. Tio efektive okazis. La solenan inaŭguron prezidis Renato Corsetti, bonvenigis nin la prezidanto de la torina Esperanto klubo, parolis skabenino de la urbo Torino. La senatano kaj urbestro de la venonta kongresurbo Mazara del Vallo invitis nin ĉeesti la 79-an Italan Kongreson okazonta en Sicilio. Tie oni intencas starigi Centron por Interkulturo kaj Esperanto. La ĉefan paroladon prezentis la prezidento de UEA Probal Dasgupta.

La kongreso okazis en Villa Gualino, kie estas hotelĉambroj kaj pluraj konferencejoj. De la hotelĉambro ni havis belan panoramon al la urbo Torino bordita per Alpmontaro. Bedaŭrinde, la montoj estis vualitaj per nuboj ĝis la antaŭlasta tago. En la unua kongresa tago okazis rande de la urbo Verda Foiro simile kiel dum la UK-oj. Du seminarioj, fakaj kunvenoj, prelegoj, KER-ekzamenoj, E-kursoj kaj lecionoj de la itala lingvo, publikaj diskutoj, prezentadoj de diversaj libroj kaj pluraj ekskursoj konsistigis la semajnan programon. Prelego pri Komenio vekis intereson kaj ankaŭ tiu pri “Zamenhof profeto de Eŭropo” trovis siajn adeptojn malgraŭ malfrua nokthoro. Gejunuloj havis aldonan programon, infanoj lerte desegnis, modlis kaj poste instalas malgrandan ekspozicion.

Riĉenhavaj estis ĉiuj vesperaj programeroj. Kantis la kataluna muzikgrupo “Kaj Tiel Plu”, la litova familia bando Asorti, la itala profesia grupo Reverie, duopo Nane kaj Ankie el Nederlando, la sveda gitaristo kaj kantisto Martin Wiese kaj la itala romantikulo Manuel Rovere, kiu ankaŭ prizorgis ĉiujn artistojn provizante ilin per sia aparataro. Dum la Internacia vespero prezentiĝis artistoj el niaj vicoj

kantante, recitante poemojn, ludante violonon, pianon, kaj aliajn nekutimajn instrumentojn. Trupo de polaj junulinoj prezentis modernajn danckreaĵojn. Ĉio-ĉi estis interesa kaj bunta spektaklo. Al la kulturaj programeroj apartenis ankaŭ prezento de du teatraĵoj. Unu originale verkita de Mikaelo Bronŝtejn “Dek tagoj de kapitano Postnikov” estis adaptita kaj prezentita de Saŝa Filipoviĉ kun aliaj du aktoroj. La dua (tradukita) teatraĵo temis pri “Roma Triptiko”. Ĝi impresis iom mistere. Oni prezentis ankaŭ la filmon de Roman Dobrzinsky “Japana printempo”, kiu gajnis la unuan premion en Belartaj Konkursoj. Ne malpli plaĉa estis la filmo pri Odeso kaj bildoj pri odesaj katakomboj, kiujn prezentis Tatjana Auderskaja el Ukrainio. Interesaj estis bildoj kaj libro pri Bona Espero en Brazilo, prezentita de la italbrazila paro Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia.

Pri la evento interesiĝis ankaŭ politikistoj (kun favora sinteno al Esperanto), ĵurnalistoj, televido kaj aperis kelkaj artikoloj en la loka gazeto. En TTT-paĝoj estis aperigitaj freŝaj novaĵoj. Por la kongreso estis pretigitaj du specialaj bildkartoj, kiujn oni povis stampigi per poŝta memorstampo.

Estis organizitaj kvar duontagaj ekskursoj. Oni konatiĝis kun la urbo Torino, ĝiaj muzeoj, palacoj, katedralo, botanika ĝardeno, mezepoka urbo kaj ĝia fortikaĵo, religiaj objektoj kaj simboloj de la urbo kaj vespere estis organizita vizito al astronomia observejo. Dum la tuttagaj ekskursoj oni vizitis la urbon Verĉeli kaj apudajn kastelojn, la turisman urbon Stressa kaj la lagon Maggiore (en kiu oni vizitis tri belegajn insulojn), la valon de Susa en okcidentaj Alpoj, kie troviĝas imponaj fortikaĵoj kaj bela abatejo de Sankta Mikaelo.

Dum la ĉi-jara Itala Kongreso estis elektita nova estraro de la asocio. Ĉe la fino de la kongreso la sekretariino Laura Brazzabeni dankis ĉiujn ĉeestantojn pro ilia partopreno kaj fermis la kongreson. Venotjare oni atendas ankoraŭ pli da partoprenantoj en la bela varma Sicilio. Surloke jam aliĝis pli ol 50 gesamideanoj. Aliĝu ankaŭ vi kaj ĝuu la varman etoson en Sicilio!

*Liba Gabalda*







# La 78a Itala Kongreso de Esperanto 20-27.8.2011

Venezuela Esperanto-Asocio



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda





## Venezuela de Antier (Venezuela de la Pasinto) Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho

Venezuela Esperanto-Asocio

Estas tema parko fondita je la 31<sup>a</sup> de julio 1991. Ĝi havas 18 hektareojn kaj montras la arkitekturojn, folkloron, manĝartojn, muzikojn, morojn kaj historio de diversaj regionoj de Venezuelo dum la komenco de la XXa jarcento.

Ekde la komenco estis kolonia domo, sukerkanejo, dometoj faritaj el koto, ŝtona katelo, indiĝenaj domoj, tipaj domoj de la ŝtato Zulio kaj preĝejo, iom post iom esti aldonitaj kelkaj tipaj mirindaĵoj de 12 regionoj kaj ŝtatoj de la Venezuelo de la gomezisma (reĝimo de Juan Vicente Gómez): Orienta, Ebano, Falkono, Mirando, Aragvuo, Truhilo, Zulio, Karakaso, Laro, Amazonio, Taĉiro kaj Merido. Ankoraŭ estas konstruontaj Karabobo, Bolivaro kaj Jarakujo.

Aldone al jam menciitaj allogaĵoj, ĝi enhavas 86 malnovajn kaj klasikajn aŭtomobilojn, vi povas gustumi

tipajn trinkaĵojn, dolĉaĵojn kaj manĝaĵojn, danci kaj spekti filmetojn kaj teatraĵojn.

### Biografio de la kreinto:

Romer Alexis Montillas naskiĝis je la 22<sup>a</sup> de majo 1944 ĉe la vojo de Mérida-Apartadero-Timotes. Liaj gepatroj estis Mario Montilla kaj Ninfa Delgado. Li estas entreprenisto, fama kolektisto de antigvaj aŭtomobiloj, kaj kreanto de tri belaj temaj parkoj: Los Aleros (pri dometoj, vestaĵoj kaj tipaj moroj de la andaj vilaĝetoj de Venezuelo je la 1930<sup>a</sup> jaroj), Venezuela de Antier (ĝi montas laŭ la ŝtatoj la plej tipajn mirindaĵojn, laŭ la epoko de la diktatoro Juan Vicente Gómez), Montaña de los Sueños (pri Filmoj kaj historio de la filmo-arto laŭ la 1930 ĝis la 1960 jaroj).







# Venezuela de Antier (Venezuela de la Pasinto)

Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho

## Kaverno de la Gvaĉaro (Cueva del Guácharo)



Gvaĉaro (Guácharo, nokta birdo)



Arko de la Federacio



Turo laŭ la kastelo de Sankta Rozo (Castillo de Santa Rosa) en la insulo de Margarita, tie mortis la fama heroino por la sendependeco Luisa Cáceres de Arismendi.





**Venezuela de Antier (Venezuela de la Pasinto)**

Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho

Venezuela Esperanto-Asocio



**Danco nomumita Tamunangue**



**Mapo de la Insulo Margarita**



**Veto de kuniklo**



**Cuatro: tipa gitaro de latinomarko, ĝi nur havas kvar kordojn**



**Botica (Botika): antiva apoteko en Venezuelo**








## Venezuela de Antier (Venezuela de la Pasinto)

Raporto kaj fotoj: Ricardo Coutinho

**Statuo de la Dancantaj Diabloj de Jare (Estatua de los Diablos Danzantes de Yare). Jare estas urbeto de la Ŝatato Mirando, tie okazas fama folkloro rituala en la epoko de Kristokorpa festo.**



**Toreejo, aludanta Plaza de Toros de la urbo Marajo**



**Domo farita el koto kaj kano**







# Greguerías: La spritaĵoj de Ramón Gómez de la Serna

## Ramón Morales Castel

Laŭ Ramón Gómez de la Serna la vorto hispanlingva *greguería* havis origine la signifon "blekado de porkidoj". Nuntempe la vorto signifas simple kriado aŭ kriaĵo, sed Ramón Gómez de la Serna prenis ĉi tiun vorton por igi ĝin propra nomo de ia speco de aforismo tiel, ke la vorto *greguería* estas jam en nia plej fama vortaro (la Vortaro de la Reĝa Akademio Hispanuja) kun la jena signifo:

**greguería.** Artículo emmendado

(De griego).

1. f. gritería.

2. f. Agudeza, imagen en prosa que presenta una visión personal, sorprendente y a veces humorística, de algún aspecto de la realidad, y que fue lanzada y así denominada por el escritor Ramón Gómez de la Serna.

Real Academia Española © Todos los derechos reservados

1. kriado (aŭ blekado). 2. Spritaĵo, bildo proza reprezentanta personan imagon surprizan kaj foje humuran pri iu trajto de la realo, kaj kiu estis tiel ekuzita kaj tiel nomita de la verkisto Ramón Gómez de la Serna.

Li mem donis formulon por estigi greguerías: **Humuro + metaforo = greguería**. Por mi, de la vidpunkto tradukista, traduki *greguerías* havigas kelkajn problemojn. Mi ĝenerale kaj por tradukaj celoj dividas tiujn spritaĵojn en du aroj:

1) Tiuj spritaĵoj, kiuj povas esti laŭvorte aŭ laŭlitere tradukitaj sen perdo de la originala senco kaj intenco [la spritaĵo estas nure semantika].

2) Tiuj, kiuj ne devas esti laŭvorte aŭ laŭlitere tradukitaj, ĉar ili perdas la originalan sencion aŭ intencon pro tio, ke ili estas vortludoj de la hispana lingvo [la spritaĵo estas precipe morfologia rilate al la hispana lingvo, kvankam ne nure ĉiam].

Ekzemploj de numero 1 estas la jenaj spritaĵoj (miaj komentoj inter kvadrataj krampoj):

"*El langostino huele a todo el mar*". ("La salikoko odoras je la tuta maro".)  
[Langostino estas granda speco de salikoko.]

"*Los sordos ven doble*". ("Surduloj vidas duoble".)  
[Eble ĉar ili iras duope aŭ eble ĉar ilia vidado estas pli disvolvita.]

"*Las golondrinas entrecomillan el cielo*". ("La hirundoj citiligas la ĉielon".)  
[La formo de tiuj birdoj en la ĉielo similas al citiloj.]

"*Las gallinas son tartamudas*". ("Kokinoj estas balbutulaj".)  
[La blekado de kokinoj estas kvazaŭ balbutado.]

"*El mar hace encajes de espuma y susurro al llegar a la playa*".  
("La maro faras punktojn el ŝaŭmo kaj susuro alveninte al la strando".) [Metaforo beletra.]

"*La cebra es el animal que luce por fuera su radiografía interior*".  
("La zebro estas la besto tiu, kiu elmontras ekstere sian radiografion internan".) [Humura bildo metafora.]

"*Mariposas: almejas del aire*". ("Papilioj: mituloj de l' aero".)

"*Era un pintor tan viejo que se le habían quedado calvos los pinceles*".  
("Li estis pentristo tiel maljuna, ke liaj penikoj senhariĝis".)





## Greguerías: La spritaĵoj de Ramón Gómez de la Serna Ramón Morales Castel

"El filósofo antiguo sacaba la filosofía ordeñándose la barba".  
("La antikva filozofisto eligis filozofion per melkado de sia barbo".) [Humura bildo metafora.]

"Al mar le gusta la impunidad y por eso borra toda huella en la playa".  
("La maro ŝatas senpuntecon kaj tial ĝi forviŝas ĉiujn spurojn sur la strando".)

"La primera radiografía que se hizo el hombre fue al poner la mano frente a la llama de la vela".  
("La unua radiografio, kiun la homo ricevis, estis fare de lia mano antaŭ la flamo de la kandelo".)

"En las máquinas de escribir sonríe la dentadura postiza del alfabeto".  
("En la skribmaŝinoj ridetas la proteza dentaro de la abocodaro".) [Humura bildo metafora.]

Ne ĉiu greguería estas frazo. Ekzemple: "Meteorología: mentirología". Ĉi tie Ramón Gómez de la Serna faras kaj vortoludon kaj semantikan spritaĵon, danke de simileco tiu, kiun li mem estigas fare de la elpensita vorto *mentirología*. *Meteorología* estas esperante meteologio, dum *mentirología* estas barbarismo kreita per la vortoradiko *mentira* (mensogo). Tiu ĉi spritaĵo apartenas al la dua grupo, la spritaĵoj tiuj, kiujn oni ne indas traduki laŭlitere aŭ laŭvorte pro perdo de ia originala intenco. Mi povas traduki jene: "Meteologio: mensogologio". Tio ĉi havas sencon. La meteologio estas fojfoje tiel maltrafa, ke oni povas ja opinii ĝin ia mensogologio. Sed la simileco morfologia inter tiuj vortoj (meteologio, mensogologio) en la hispana lingvo estas pli granda. Kaj ĝi estas, laŭ mi kaj ĝis nun, la plej facila el tiuj tradukproblemoj. Jen aliaj spritaĵoj de la grupo 1:

"Como daba besos lentos duraban más sus amores". ("Liaj kisoj estis longdaŭraj, tial liaj amindumadoj daŭris pli".)

"Anda de otra manera aquel al que le faltan botones en los calzoncillos." ("Kiu havas butonojn mankantajn en sia kalsono, tiu paŝadas alimaniere".)

"Los rosales son poetas que quisieron ser rosales". ("Rozujoj estas poetoj, kiuj volis esti rozujoj".)

"Donde el tiempo está más unido al polvo es en las bibliotecas". (Kie la tempo estas pli unuigita al la polvo, tie estas en bibliotekoj".)

"Un chino inventó al gato". ("Iu ĉino inventis katojn".) [Pri tiu spritaĵo: supozas mi, ke ĝi temas pri la populara kredo en multaj landoj de Latinameriko, ke la ĉinoj inventis preskaŭ ĉiujn aĵojn de nia nuna mondo. Eĉ katojn... Ĝi estas do komprenebla ŝerco latinamerika.]

"Las estrellas de mar son las manos que constatan que el barco se ha hundido". ("Marsteloj estas la manoj certigantaj, ke la ŝipo mergiĝis".)

"Me comenzó a coser botones grandes para ojales chicos. Tuve que echarla." ("Ŝi komencis kudri grandajn butonojn por malgrandaj butontruoj. Mi endis forpeli ŝin".)

"Sofá-cama: los sueños quedan debajo y la conversación arriba". ("Lito-sofo: sonĝoj restas suben kaj interparoloj supren".) [Lito-sofo estas meblo transformigebla jen en lito jen en sofo laŭbezone.]

"La reja es el teléfono de más corto hilo para hablar de amor". ("Krado estas la telefono plej kablo-mallonga por paroli pri amo".) [Imagu du junulojn parolantajn pri amo dividitaj per iu krado.]

"No olvidéis que el ángel inventó la espada". ("Ne forgesu tion: glavon anĝelo inventis".) [Plej eble temas pri biblia mito. Tamen la frazo povus servi ankaŭ por esprimi tion: iu bela anĝela ulo povus esti pova aŭ perfortema...]

"Nerviosismo de la ciudad: no poder abrir el paquetito del azúcar para el café". ("Urba nervozigado: ne povi malfermi la porkafan sukeran saketon".)

La citaĵoj hispanlingvaj devenas de la libro **Greguerías, de Ramón Gómez de la Serna, Selección 1910-1960. Editorial ESPASA-CALPE S.A., Colección Austral. Libro número 143.**







# Word Race: unua iPhone-ludo en Esperanto!

(Deveno de la informo: Ret-Info <http://www.eventoj.hu>)

Hodiaŭ aperas la unua iPhone-ludo en Esperanto, Word Race. Ĝi estas nekutima ludo pro tio, ke oni ludas grupe kun amikoj anstataŭ sole. Oni devas klarigi vorton al sia teamo sen uzi la malpermesitajn vortojn. Ekzemple, se la vorto estus "barbo", oni ne rajtus diri "haroj" aŭ "Zamenhof". La teamo, kiu plej rapide klarigas siajn vortojn, venkas!

La provludo senpagas, sed per lanĉ-oferto oni povas aĉeti la ĝeneralan vortpakaĵon kontraŭ 2,39 eur (kutime kostas 2,99 eur). Ni poste volas eldoni ankaŭ vortpakaĵon nur pri Esperanto-kulturo!

Nia retejo: <http://www.wordraceapp.com>

Rekta ligilo al la ludo:

[http://itunes.apple.com/app/\\*\\*word-race/id441700002?mt=8](http://itunes.apple.com/app/**word-race/id441700002?mt=8)<<http://itunes.apple.com/app/word-race/id441700002?mt=8>>

Intervjuo ĉe Libera Folio:

[http://www.liberafolio.org/\\*\\*2012/kiel-difini-melonon-ne-\\*\\*dirante-frukto](http://www.liberafolio.org/**2012/kiel-difini-melonon-ne-**dirante-frukto)<<http://www.liberafolio.org/2012/kiel-difini-melonon-ne-dirante-frukto>>

Ĝuu!

Chuck Smith

el [Nsir] Nova Sento in rete n.770